



# Informal Bulteno

ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 7 - 8

Julio kaj Aŭgusto 1963

12-a Jaro

## 48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

### Deziresprimo de Katolikoj-Esperantistoj okaze de la kunveno de I.K.U.E.

La Ĉiulandaj Katolikaj Esperantistoj, kunvenintaj al la Kongreso en Sofio, levas al sia Patrono, Kardinalo Jakobo Lercaro, la jenan deziresprimon: laŭ propono de Adv. Raffaele Bagnulo:

profunde kliniĝintaj al la majesto de la kardinala Purpuro kaj al Via respektiginda Eminenca Moŝto ili humile esprimas la deziron, ke Vi bonvolu submeti al nia Sankta Komuna Patro kaj apogi la peton, ke la Vatikana Radio aldonu al la dissendoj en aliaj lingvoj tiujn en Esperanto, donante, tiel, al ĉiuj esperantistoj, apartenantaj al ĉiu kredo, sed ĉiuj ligitaj per la spirito de kristana frateco, la eblecon aŭskulti la konsolan kaj kuraĝigan parolon de la Patro de l' homaro por ĝia kunigo en paca kunvivado kiel fundamenta paŝo al "una ŝafejo".

Krome, ili petas, ke Via Eminenca Moŝto bonvolu digni prezenti al Lia Sankta Patro la aspiron al la graco, konsistantan en la renovigo de la beno, kiun la Esperanto-movado ricevis de Sankta Pio X-a; kaj samtempe ili esprimas al Via Eminenca Moŝto sian dankemon renovigante per la kiso la omaĝon al la Sankta Purpuro kaj petante ankaŭ Vian benon genuiĝante en la humileco de filoj de la Eklezio.

### Ferrovjista renkontiĝo en la kadro de 48-a U.K.

En la Centra Telefona Palaco en Sofio okazis merkrede la 7-an de aŭgusto 1963-a je la 15-a horo, ferrovjista renkontiĝo en la kadro de 48-a U.K. Ĉeestis pli ol 300 ferrovjistoj-Esperantistoj el 16 landoj. En la granda salonego, ĉe la prezida tablo sidis la Vicministro pri Transportoj kaj Komunikado kamarado Naŝo Simeonov inter la reprezentantoj de la diversaj landoj kaj la estroj de Bulgara Ferrovjista Esperanto-Societo. Ĉeestis ankaŭ la reprezentanto de I.F.E.F. S-ro Popti, unua sekretario de nia Federacio.

Post bonvenigaj vortoj de la Vicministro, nia kara amiko S. Pizarov raportis pri la atingiĝoj de ferrovjistoj rilate al iliaj sociaj vivkondiĉoj, la detala raporto ricevis vere senfinan aplaudon.

Oni aprobis la jenan proponon de la rezolucio pri plifortigo de la rilatoj inter ferrovjistoj-Esperantistoj, laŭte legata de la Prezidanto de la Bulgara Ferrovjista Esperanto-Societo, kiu enkondukis la renkontiĝon:

#### REZOLUCIO

akceptita de la fakkunveno de la ferrovjistaj esperantistoj en la kadro de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, la 7-an de aŭgusto 1963-a.

La kunvenintaj en fakkunveno de la ferrovjistaj esperantistoj en la kadro de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, la 7-an de aŭgusto 1963-jaro, pridiskutinte la demandon pri la rilatoj inter la apartaj sekcioj de I.F.E.F. en diversaj landoj, partoprenantaj la fakkunvenon, akceptis la jenan

#### rezolucion:

1. Oni kreu konstantan, regulan, aktivan kontakton inter la sekcioj de I.F.E.F. en la diversaj landoj.

2. Oni kreu regulan kontakton kun la Estraro de I.F.E.F., traktante sur vasta bazo ĉiujn organizajn, profesiajn, teknikajn kaj ĝeneralajn demandojn.

3. Oni organizu vastan kaj konkretan korespondadon inter la diversaj filioj de la fervoja transporto.

4. Oni iniciatu konstantan interŝanĝon de sperto inter la diversaj fakoj de la fervoja transporto.

5. La fakaj kunvenoj de la fervojistoj en la kadro de la universalaj kongresoj de Esperanto estu anticipe bone preparitaj kaj organizitaj kun partopreno de estrarano de I.F.E.F.

La prezidanto de Bulgara Fervojista Esperanto-Societo donis la vortojn al la landaj reprezentantoj kaj al sekretario de I.F.E.F. Ekkomencis nia kara Hungara amiko D-ro Bacskai, poste nia Itala reprezentanto Gimelli kaj sekve la reprezentantoj de Rusujo, Svedujo, Francujo, Nederlando, Aŭstrio, Germanujo, Svislando kaj aliaj. Laste parolis la Pola reprezentanto S-ro Nawrowski kiu alvenis, ŝajnas al mi, lastmomente.

Poste la ĉeestantaro estis invitata de la Vicministro Naĉo Simeonov en la enirejo de la salonego kie oni regalis al ni per luksa vespermanĝo abunde malsekigita per biero kaj aliaj trinkaĵoj. Apartan dankon ni italoj ŝuldas al S-ro Simeonov, jam fervojisto, ĉar li donis al ni la taskon transdoni buŝajn kaj skribajn salutojn al la urbestro de Bologna Hon. Dozza, lia amiko.

Ni sendas al S-ro Pisarov kaj al aliaj multnombraj helpantoj la plej varmajn gratulojn pri la brila organizo de tiu mirinda renkontiĝo, kaj al la organizantoj de la renkontiĝoj de la fervojistoj en la kadro de la venontaj Universalaj Kongresoj, la instigon al same brile agi.

#### LA VIVO DE D-RO L.L. ZAMENHOF EN BILDOJ

Jam delonge trafis min la fakto, ke mi ĉiam vidas pri D-ro Zamenhof la samajn fotojn, mi opiniis, ke devas esti ankoraŭ multaj fotoj en la manoj de malnovaj samideanoj, kiuj renkontis Zamenhof dum la kongresoj de 1905-1913.

Kiam la Zamenhof-jaro 1959 alproksimiĝis, la ideo estiĝis ke mi povas fari ion por la movado, kolektante la ankoraŭ ekzistantajn fotojn. Mi forsendis multegajn leterojn kaj mi vizitis arkivojn eksterlande. Mi ricevis multajn fotojn kaj mi reproduktigis ilin. La kolekto pligrandiĝis iom post iom kaj nun konsistas el 260 fotoj. Mi kore dankas al ĉiuj, kiuj helpis min.

U.E.A. rekonis tiun laboron kaj petis min iĝi konstanta kunlaboranto de la Centre de Eksploro kaj Dokumentado (C.E.D.) kiel gvidanto de la "Fotoservo pri Zamenhof" por kolekti la fotojn el la vivo de Zamenhof kaj de ĉio en ligo kun lia laboro. U.E.A. eldonis la liston de Zamenhof-fotoj kiel dokumenton CED/INT./15 okaze de la 75-jara datreveno de Esperanto (26-7-1887/1962) kaj de la 75-jara datreveno de la edziĝo de D-ro L.L. Zamenhof al Klara Zilbernik (9-8-1887/1962). Henk THIEN. Uiterwaardenstraat 12. AMSTERDAM (Nederland)

#### ESPERANTO-PROSPEKTO PRI LA URBO NANCY (FRANCUJO)

La Turisma Servo en Nancy ĵus eldonis esperantan aldonon al la turisma prospekto pri tiu urbo. Ĉiu interesato povos ricevi senpage la belan nacilingvan koloran broŝureton (oni precizigu: en la lingvo franca, germana, angla) kune kun la esperanta teksto.

Ni memorigu ke Nancy situas en nordorienta Francujo, ĝi estas eŭropa voj-etape inter Benelukso, Germanujo kaj Svislando.

Esperantistoj multnombraj skribu per subteni la klepedojn de la lokaj sam-preparante viziten al nia regiono, avertu la lokajn Esperante-delegitojn kiuj klepedas starigi reten de turismaj interpretistoj. (Vidu la Jarlibron!) Oni turnu sin al: TURISMA SERVO - 9, rue des Dominicains NANCY (M.-et-M.)

**FERROVIERI ESPERANTISTI PARTECIPATE ALL'ELEZIONE DEL RAPPRESENTANTE DELLA NOSTRA ASSOCIAZIONE NEL COMITATO PERMANENTE DELL'I.F.E.F.**

16-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

ADRESO: Centra Stacidomo-Bruselo TELEFONO: (02) 568382  
Bankkonto: N° 357/10470/13 - B.E.F.A. - Bruselo 19 - ĉe Kredietbank-Bruselo  
Poŝtĉekkonto: 4770.76 - B.E.F.A. - Bruselo 19 -

A N T A Ŭ I N F O R M O J

KONGRESKOTIZO: Ĝis 31-12-1963: 200 B.Fr. Ĝis 31-03-1964: 300 B.Fr.

Poste: 350 B.Fr. Simpatiantoj: 50 B.Fr. Familianoj, pensiuloj kaj junuloj malpli ol 25 jaroj: 50 %.

KONGRESEJO: Ĉiuj salonoj kaj salonegoj de la Brusela Centra stacio estas senpage je la serve de nia 16-a ek de la 4-a ĝis la 17-a de majo 1964.

Tien ni dankas al S-ro Bibauw, la ĉefingeniero pri la ferveja konstruaĵoj.

GLUMARKOJ: Por individuoj: Vi deziras glumarkeoj? Sendu kiel presajon minimume unu internacia respondkupono al nia adreso kaj metu vian adreson sur la dorsflanko de la leterkeverte. Ni resendos al vi 3 foliojn=12 glumarkeojn.

Por la landaj IFEF-filioj: Ili kompreneble je ĉiu mende ricevos specialan kondiĉon per la uzo de la landa sekcio. Per 50 B.Fr. ili ricevos 35 foliojn.

LOGADO: Ĉiu kongresano estas logigata je maksimume 15 minutejn de la Kongre.

Logkategorioj: A: 250 B.Fr. Hotele - B: 200 B.Fr. Hotele - C: 150 B.Fr.

Hotele - D: 100 B.Fr. Hotele - E: 50 B.Fr. Amasloĝeje. En ĉiuj prezoj estas enkalkulataj la tranekto, matenmanĝo, imposte kaj servmeno.

JUNULARPROGRAMO: Ĉar la B.E.F.A. ne jam havas propran junularsekcien la junularsekcio de la Belga Esperantista Federacio (BEJA) akceptis la organizadon de la junularprogramo de nia 16-a. Adreso: B.E.J.A. Dambruggestr. 296 Antwerpen. La tuta junularprogramo okazos merkredon la 12-5-1964 ek de la 15-a hore en la junulargastejo "Sippelberg" Poststr. 91/93 Bruselo 3.

KONGRESKARTOJ: Ili jam estas ĉe la presisto. La datumigo ĉe la poŝto ĉe la ensendo de via aliĝilo, validos per la fiksado de via kongreskotizo.

Ĉiuj pagoj okazu, kiel eble plej baldaŭ, pere de la kongresaj bank- aŭ poŝtĉekkontoj, aŭ pere de landaj I.F.E.F.-filioj.

EKSKURSPLANO: A- Tuttagaj ekskursoj: 1) En la Belgaj Ardenoj. 2) Laŭ la marbordo al Antwerpen. B- Duentagaj Ekskursoj: 1) Bruselo kaj la ĉirkaŭaĵoj. 2) Waterloo kaj miniatura Belgio. 3) Vizitoj al fervejaj instalaĵoj.

C- Postkongrese: Antwerpen la mendhavene kaj arturbo.

LA MONDCIVITANOJ ALVOKAS LA ESPERANTISTOJ

La ĝenerala sekretario de "SERMONDO" (mondanista dokumenta serve en Parizo) iniciatis, komence de 1963, proponi la starigon de "mondanista reto de esperanta tradukado" per la plivastigo de la interŝanĝoj inter la mondaniŝtoj kaj iliaj diversaj diverslandaj organizoj.

La tre favora akcepte, kiun renkontis tiu projekto (kiu tamen necesigos gravan disvolven de rimedoj kaj klopodoj) permesas memente antaŭvidi ĝian aplikadon laŭ malgranda skale profite al nur unu organizo: la Internacia Registro de la Mondcivitanoj (I.R.M.C.). La I.R.M.C. eldonas en ĉi naciaj lingvoj kaj en Esperanto la karton de mond-civitano. Ĝi ĉiam renkontis plej simpatian akcepton flanke de la esperantistoj per disvastigi la ideon de mond-civitaneco, kaj esperas trovi inter ili la kvalifitajn tradukantojn, sen kiuj ĝi ne povus atingi la novajn celojn, kiujn ĝi decidis surproni.

Petu de I.R.M.C. 55, rue Lacépède, Paris (5 ĉme), ĝian elementan ĝeneralan dokumentaron (senpagan) kaj ĝian dokumentaron rilatan al la mondanista reto de esperanta traduko.

Signife de la glumarke de nia 16-a I.F.E.F.-Kongrese en Bruselo:

LA VERDA LUMO DE LA BELGA FERVOJA SIGNALSISTEMO JAM NUN STARAS MALFERMITA POR LA ESPERANTISTA FERVOJISTA MONDO EN LA DIREKTO DE LA BRUSELA CENTRA STACIO POR LA 9-a ĜIS LA 15-a DE MAJO 1964 OKAZE DE LA 16-a IFEF-KONGRESO

oooooooooooooooooooo  
oooooooooooooooooooo

FIDELA KAJ MERITPLENA AMIKO FORLISIS NIN

Gravan skuan denis al ni informe el Parize, ke la 2-an de aprilo subite mortis nia neforgesebla amiko Robert Retault. Bate, kiu malfacile estas imagebla ĉar li mortis en la forte de la vive. La morto finis la labereman vivon en relative juna aĝo kaj ĝuste pro tio la malĝojiga infermo trafis nin neatendite. La meritoj de Retault estas multaj, ampleksaj kaj multflankaj. Robert Retault estis modesta homo kaj malofte venis en la lumradiejo sur la scenejo, kio karakterizas la homon Retault. Ofte silenta sed ĉiam observema kun iom ironia rideto, Robert Retault estis elstara figuro de nia faka movado. Li kredis je la eblecoj de Esperanto kaj pro tio ĉiam malaprebis mallertajajn kaj inercien. Li senhalte kaj senbrue sin dediĉis al nia ideale celante ĉiam al pli kaj pli perfektaj rezultoj. Amikejn li havis en ĉiuj landoj; nedubleble ke la anenco de lia malapere trevos deloran ĉion en ĉiuj koroj. Lia memoro restu per ni ĉiuj ekzemplo. Al lia edzino, fidela kunlaborantino de liaj taskoj, ni esprimas nian profundan simpatian kaj emecie sin ni kondolencas. Ankaŭ per F.F.E.A. la vunde estas malfacile rekuracebla, al ĉiuj nian sinceran partoprenon en la grava perdo.

La vive ne haltas, la batalado per realigi nian komunan idealon estu daŭrigata honore al tiuj, kiuj donis dum la vive ĉiujn siajn fortejn pro tio. En tiu longa batalado nia amiko Retault estu al ni ekzemplo. Robert Retault la Italaj Fervojistoj-Esperantistoj esprimas la sinceran dankon per ĉio, kien vi faris per nia organizo dum la vive. Eterne vi restes en niaj memoroj, ripozu en paco!

F. F. E. A. F U N E B R A S

Alian bate frapas nian fratan Francan Fervojistan Esperanto-Asocien. Lastmomente ni ekscias la subitan forpasen de nia fidela amikino Renée Marc, kiu okazis sabaton la 15-an de junio.

Renée Marc, estraranino de F.F.E.A. kaj de la Pariza Norda Grupo, estis malnova kaj fidela membro de nia Movado kaj partoprenis ofte al niaj Internaciaj Kongresoj. Tiu neatendita frapo de la sorte estas nova grava perdo per Fervojista Esperanto-Movado. Ŝi ofte partoprenis ankaŭ al niaj Italaj Naciaj Kongresoj de Esperanto kaj al Jarkunveno de I.F.E.A., pro tio la Italaj Fervojistoj-Esperantistoj estis aparte frapitaj de tiu teruran novaĵon.

Al ŝia familio, ni sendas niajn plej sincerajn kondolencejn.

N O V A Ĵ O J D E N I A J G R U P O J

En Torino ĉe "Depelavero Ferroviano" (Postlaboreja Klubo Fervojista) restariĝis la Fervojista Esperanto-Grupo jam fondita de nia aktiva membro Kom. Franceske Domeniko Ramelfe, en la malpreksima jaro 1918-a. Nun helpas S-anon Ramelfe-a en lia nebula klepedo la junaj Samideanoj Rag. Fernaggie kaj Geom. Riotta.

Ni esperas ke aliaj Samideanoj imites niajn amikejn en Torino kaj helpes en la disvastigo de Esperanto en la fervojista medio.

ESPERANTO EN LA RADIO = RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO

Casella Postale 320 ROMA (Italia) - La dissendoj okazas de la h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj: metroj 30,90; 41, 24 kaj 50,34.

DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1963-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto. SEPTEMBRO 1963-a - mardon la 3-an: Tra la literaturo - vendredon la 6-an: Tra la italaj vitejoj - mardon la 10-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 13-an: Giovanni Beccaccio - mardon la 17-an: Florence - vendredon la 20-an: Vizito al la tombo de Dante en Ravenna - mardon la 24-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 27-an: La luno en la itala literaturo. OKTOBRO 1963-a - mardon 1: Tra la literaturo - vendredon 4: Franciskanaj sanktejoj: La Verna - mardon 8: Novaĵoj el Italujo - vendredon 11: Italaj komponistoj: Giuseppe Verdi - mardon 15: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredo 18: Itala folkloro - mardon 22: leterkesto - vendredon 25: Italujo kaj fremdaj verkistoj: A. De Musset - mardon 29: Mitoj kaj legendoj pri la floroj.

La Fakestro: L. MINNAJA

FAKPRELEGO EN STOKE-ON-TRENT

Nur per niaj membroj, ni ĉi sube publikigas resuman de la fakprelego en la cele infermi la ne-kongresanoj. La kompleta tekste estas multe pli interesa, sed multe pli longa, ĝi aperas en "La Internacia Fervojistoj".

Ni gratulas ĉiujn organizantojn de ĉi tiu bonega prezentita fakprelego, kaj komplimentas la tradukinton amiken Frank CURTISS.

LA RILATOJ INTER LA BRITA FERVOJO KAJ LA KONTINENTO

NUNAJ KAJ ESTONTAJ. Verkita de S. J. Pickard.

Ĉi tiu artikolo pritraktas la servojn de la Brita Fervojo inter Britujo kaj la Eŭropa Kontinento laŭ kvar tipoj. Unue, la konforma pasaĝera serve kiu havas kvin vojojn, nome: Dover/Folkestone - Calais/Boulogne; Newhaven - Dieppe; Southampton - Le Havre; Southampton - Saint Malo kaj Harwich -Heek van Holland. Malgraŭ granda konkurence de aertransporte, la mara pasaĝera trafiko multe kreskis dum la jaroj 1951-1961. Due, la akompanata aŭtomobila serve inter Dover kaj Boulogne kiu havas du ŝipojn. La plej nova estas la Maid of Kent kiu havas du ferdekojn per aŭtomobiloj kaj specialajn manovri-  
lejn per faciligi endekiĝon. Tria, konformaj frajtaj kaj frajtujoj servoj per porti diversajn trafikejn, ekzemple ĝeneralajn varojn, vinon, fruktojn kaj legomojn. Ĉi tiuj servoj funkcias laŭ la jenaj vojoj: Newhaven-Dieppe; Folkestone-Boulogne; Harwich-Antwerp/Rotterdam; Gøele-Kopenhage. La pasaĝeraj ŝipoj kiuj vojaĝas al Le Havre kaj al Saint Malo de Southampton kaj al Heek van Holland de Harwich ankaŭ portas frajton. La kvara tipe de transmara serve estas la trajnpramo. Estas du vojoj, nome: Dover/Dunkerque kaj Harwich Zeebrugge. La ŝipoj povas porti 38 kontinentajn frajtvagonejn kaj tiu en la serve inter Dover kaj Dunkerque ankaŭ povas porti 30 aŭtomobilojn kaj 800p.

Estas kelkaj problemoj rilate al la estonta evoluo de la transmara servoj. Unue, pro la fakto ke novaj ŝipoj baldaŭ estos necesaj, oni atendas la deciden de la brita kaj franca registarej pri la konstruo de marlige, aŭ tunele aŭ ponto. Due, la ebla enkonduko de novaj transportiloj, ekzemple la flugpendilo (veturilo kiu moviĝas sur kuseno da aere super tere aŭ akvo) sendube influos la transmarajn servojn, se ili povus funkcii sur neŝirmita akvo. La Brita Fervojo atentas ĉi tiun evoluon kaj studas la eblecon de uzado.

La Brita Fervojo estas certa ke la kontinentaj servoj havos brilan estontecen kaj ĝi firmdecidis adapti siajn ideojn per prosperigi la ligilojn inter la popolo de Britujo kaj la popolo sur la ĉeftere de Eŭrope.

oooooooooooooooooooooooooooo

NI FUNEBRAS

La 8-an de julio, pro subita malsano, mortis fraŭlino

G I N A F O P

lerta redaktistino de la oficiala organo de F.E.I. "L'Esperanto".

La Italaj Fervojistoj-Esperantistoj kune kun ĉiuj esperantistoj esprimas al la familio siajn sincerajn kondolencojn.

oooooooooooooooooooooooooooo

IMPORANTISSIMO  
(Leggere attentamente)

ELEZIONI

In seguito alle decisioni prese dal 15° Congresso Internazionale dei Ferrovieri Esperantisti, é necessario eleggere il rappresentante italiano nel futuro Comitato Permanente della Federazione Internazionale Ferrovieri Esperantisti "I.F.E.F."

Per quanto sopra è necessario che ogni nostro socio mandi urgentemente il nominativo desiderato per tale rappresentante poiché il risultato di tale elezione deve essere comunicato, entro il 15 di settembre 1963 all'IFEF, che lo pubblicherà assieme a quelli di tutti le altre nazioni, nel numero di ottobre della nostra rivista "La Internacia Fervojoisto".

Le comunicazioni col nominativo dovranno pervenire alla segretaria della I.F.E.A., Via Donato Creti, 61 Bologna, al più presto possibile, comunque non oltre il 25 settembre 1963. La comunicazione del nominativo può essere fatta utilizzando il tagliando riportato in calce alla pagina.

L'elezione potrà essere fatta anche consegnando il tagliando in calce, in occasione del Convegno Annuale dei Ferrovieri Esperantisti che avrà luogo a Saint Vincent domenica 16 settembre alle ore 19, nel quadro del 34° Congresso Nazionale di Esperanto.

FERROVIERI VENITE NUMEROSI A SAINT VINCENT

Tagliando da riempire, staccare a spedire alla Segreteria della I.F.E.A.  
Via Donato Creti, n° 61 Bologna  
entro il 25 settembre 1963 improrogabilmente

....., li . . . . .  
Spett. Segreteria della I.F.E.A.  
Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti  
Via Donato Creti, n° 61

B O L O G N A

Quale rappresentante dell'Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti nel futuro Comitato Permanente della Federazione Internazionale Ferrovieri Esperantisti "I.F.E.F." intendo sia nominato il Signor:  
Nome . . . . . Cognome . . . . . Città . . .

Il Socio della Associazione Italiana  
Ferrovieri Esperantisti (I.F.E.A.)  
. . . . .